

# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)


<http://storm.prohosting.com/jesuo/k57.htm>

<http://www.iespana.es/esperanto/k57.htm>

## Remember *the Maine!* **To the hell with Spain!**

Antaŭ jarcento, novjorka ĵurnalo *The Journal* komencis kampanjon kontraŭ Hispanio je la slogano (militkrio) *Memoru la Mejnon! Al infero kun Hispanio!* (Remember the Maine, to the Hell with Spain!). William Randolph Hearst deziris, ke lia periodaĵo atingu la kvanton de miliono da ekzempleroj disvendataj ĉiutage. Ankaŭ estis alia periodaĵo, *World* (La mondo), gvidata de Jozefo Pulitzer (ankaŭ tre mirata kaj respektata nun en Usono), kiu baldaŭ konkurencis kun tiu ĵurnalo, kaj sekve inventis multe da stultaĵoj, per kiuj li “pruvis” (same kiel Hearst klopodis fari) la kulpecon de la registaro de Hispanio pri la atenco kontraŭ la “Maine”.

Tiu “Maine” ne estis la ŝtato samnoma, sed militŝipo de la armeo de Usono, kiu vizitis neinvitite la havenon de Havano, la ĉefurbo de Kubo, kiu tiam estis provinco —aŭ kolonio, laŭ la sinteno de la diranto— hispa-



Daŭrigate je la paĝo 3-a

N<sup>o</sup> 57

Januaro/marto 2003

# Kajeroj

---

## el la Sudo



### BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

**Prezidanto: Juan Antonio Cabezas Martínez,**  
c/ Jabonerías, 6-3<sup>o</sup>D,  
ES30 001 Murcia (Hispanio)

**Vicprezidanto: Pedro Ruiz García.**  
c/ Almenara, 17, 2<sup>o</sup>B  
30004 Murcia.

**Sekretario: José Pina Tuells.**  
c/ St-a Teresa, 22-2CD  
30005 Murcia.

**Kasistino: Carmen Hernández Valdés.**  
Avd<sup>a</sup> Marín Esparta, 15-3<sup>a</sup>A  
30008 Murcia.

**Redaktoro: Jesuo de las Heras,**  
Apartado 4461  
ES30080 MURCIA

*Kajeroj el la Sudo* regule interŝanĝas kun:

- 1 *Esperanto*, redaktata de Stano Marček,
  - 2 *Monato*, de Stefan Maul,
  - 3 *Juna Amiko*, de Geza Kuruez,
  - 4 *Sennaciulo*, de Křešimir Barkovič,
  - 5 *SAT-Amikaro*, de Jean Selle,
  - 6 *Internaciisto*, de Luis Serrano.
  - 7 *La Kancerkliniko*, de Ĵak le Puil,
  - 8 *Litova Stelo*, de Petras Čielauskas,
  - 9 *Liberecana Ligilo*, de Jakoo Schram,
  - 10 *Laŭtel*, de C. Baudé,
  - 11 *La Migranto*, de Antje Noordewier,
  - 12 *SLEA-Infornilo*, de P. Persson,
  - 13 *Naturista vivo*, de Eriin Fenyvesi,
  - 14 *La verda proleto*, de komitato,
  - 15 *La Juna Penso*, de Vinko Markov.
- Al ĉiuj, dankon pro viaj subteno kaj lernigo.

*Pretigas la Kajeron:*

*Provkokorto: José Pina Tuells,*

*Redakto: Jesús de las Heras Jiménez.*

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la nova konto*  
de **La Caixa** n-ro 2100 4455 71  
0200022454. *Sen aldona kosto.* La abono  
kostas 5 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

**Kovrilo:** *Isabel Acevedo memorigas nin,  
ke la hispanoj estis la irakanoj de 1898.  
Ĉu hispanoj nun havas ion diri?*



Oni povas  
reprodukti  
artikolojn,  
kondiĉe ke  
oni citu la  
originon.

Ne subskribitajn  
artikolojn verkis la  
redaktoro.

*Ni ne korespon-  
dos pri ripetitaj ar-  
tikoloj. Tamen, ni  
klopodos publikigi  
ĉiun artikolon kies  
enhavo estas intere-  
sa kaj ne mis-traktas  
iun ajn personon.*

## Enhavo

Remember the Maine! .....	1
Redaktore .....	3
Informoj de la Prezidanto .....	4
Jam pagis .....	6
Statuto de HALE .....	8
Laŭdo al blanka papero .....	12
Ĉe la sennaciuloj .....	13
Zamenhofa tago en Pollando .....	14
La tago de Zamenhof .....	15
La faraono, 8-a ĉapitro .....	16
La saŭdaro parolas la portugalan .....	21
Ducentjariĝo de Hektor Berljoz' .....	23
Statuto de SAT, paĝoj 6a kaj 7a .....	24

*Pri la enhavo de la  
artikoloj respondecas  
la aŭtoroj mem, ne la  
redakcio.*

## Redaktore:

Lastan decembron ni publikigis *la numeron de oktobro*, kaj tio vere ĉagrenis min. Pro tio mi klopodis publikigi tiun ĉi numeron, la numeron



*de januaro*, en januaro mem, aŭ frue en februaro. Tiel ni re-havas nian normalan paŝon.

Ne multaj aferoj okazis, sekve, en la dumeco de nur unu monato. Tamen, ni havas multe diri al vi.

Plej grave, —krom la milito— la dujarcentiĝo de

**e l s t a r a** muzikisto, Ludoviko Hektor Berljoz', pri kiu oni legu je la antaŭlasta paĝo de nia magazino. Se vi povas viziti nian magazinon en Interreto (<http://storm.prohosting.com/jesuo/k57muz.htm> aŭ <http://www.iespana.es/Esperanto/k57muz.htm>), vi havos la plezuron aŭskulti kelkajn el liaj multevaloraj verkoj, inter ili la plej ŝatatan de mi, la *Fantazian Simfonion* kompletan.

La balotado en HALE jam finis, kaj la Prezidanto parolas al vi pri tio en la sekvanta paĝo. Je la kvina paĝo ni lernos pri kion ni faris la lastan *Tagon de Zamenhof*, en Alikanta restoracio. Mi sidis apud Marteno kaj Lija, kaj ni ĉiuj havis tre agrablajn festumadon, kongrue kiel taŭgas al esperantistoj. Aŭgusto Casquero sciigas al ni pri tio, kiel oni festumis tiun tagon en Pollando mem, en paĝo 14-a. En la oka paĝo, Ariádene parolas pri *saŭdado*, nova koncepto por multaj esperantistoj..., aŭ ne?

En la paĝo 10 mi denove publikigas la Statuton de HALE, jam publikigita en numeroj 33-a (antaŭa versio) kaj 34-a (modifoj) de nia magazino.

En la paĝo 13-a Toloyen diras al ni pri la graveco de blanka papero, kaj pri kion oni povas fari kun ĝi montras al ni Isabel Acevedo, de la koverto ĝis paĝo 8-a, kie petas ŝi, ke ni ĉiuj haltigu la militon.

Paĝo 15-a portas la artikolon de Adolfo Vezelay pri sennaciuloj, kaj je la 16-a ni trovas denove nian amikon *La Faraono*, de Kabe.

Mi esperas, ke la legado de nia magazino estu lerniga kaj fruktodona. Se tion ni ne sukcesas fari, plaĉus al mi scii kial. Ne hezitu skribi al mi tiucele.

*Jesuo*

### Venas de la kovrilo

na. La ŝipo estis en la haveno de la ĉefurbo de Kubo por *protekti la interesojn usonajn en la insulo*, laŭ la diro de ĝia kapitano, Karlo Sigsbee. Demandite, li diris, ke li ne kredis, ke la hispanoj subakvigis lian ŝipon, ĉar ili estis tre ĝentilaj kun li kaj ili vizitis lin ofte. Aldone, la hispanoj sendis multe da ŝipetoj por helpi la maristojn usonajn.

Sed..., ducent kvindek kvar maristoj usonaj mortis en tiu nokto, la 25-an de januaro de 1898, kaj dek mortis poste pro la vundoj. Oni devis venĝi tion. Ambaŭ ĵurnalojn komencis diri multe da stultaĵoj: laŭ ili, la hispanoj havis sendependismajn kubanojn en koncentrejoj, kiujn ĵurnaloj usonaj nomis *kampoj de morto*, hispanoj estis kanibaloj, torturistoj, eĉ kubaninoj devis militi... Intere estus viziti nun la solan koncentrejon, kiu estas en Kubo nun... Tiam la ĵurnaloj sendis centojn da ĵurnalistoj, desegnistoj kaj fotistoj por trovi kaj rakonti pri la barbaraĵoj hispanaj. Domaĝe por ili, kelkaj seriozaj profesiuloj de ĵurnalismo ankaŭ iris, kiel verkisto Stephen Crane (Stifĉen Krejn) kaj desegnistoj Frederick Remington (Frederik Reminton), kaj ili diris, ke estis nenion raportindan. La lasta diris al sia estro, ke “ne estis milito”, kaj sekve “oni devas reiri hejmen”. Tamen, estro Vilhelmo Randolph Hearst sendis tiun ĉi mesaĝon al li: *Bonvolu resti tie. Vi sendu la bildojn al mi, mi provizos la militon*. Kaj li faris tion provizante dum kelkaj semajnoj pli ol ok paĝojn tage dediĉitajn al tiu afero. Aliaj ĵurnaloj, por ne

Daŭrigas je paĝo 5-a

## Informoj de la prezidanto



*Estimataj Samideanoj.*

*Nia asocio progresas en interna demokratio: la lasta kunveno de la estraro aprobis, fine, ke la legantoj de **Kajeroj el la Sudo** povu baloti kaj havi reprezentanton je la sama rango kiel estrarano de la propra estraro. Tiu ĉi estas la unua fojo, kiam en Esperantio la legantoj povas havi propran voĉon kaj decidon en la estraro de asocio. La societano de nia asocio povas baloti, sekve, du fojojn: unu kiel societano kaj la alia kiel leganto. La maniero estas simpla: en **Kajero el la Sudo** aperos listo sen nomoj kaj la legantoj povos enmeti siajn nomojn en tiun ĉi liston kaj en la venonta balotado ili povos baloti.*

*Estimataj haleanoj ni devas esti kontentaj, ĉar HALE estas la unua Asocio, kiu ne altigas la kotizon: ni havas la saman kotizon ekde jam ses jaroj; sed HALE estas la unua Asocio de Esperantio kiu malplialtigas la kotizon, de **ses** euroj al  **kvin eŭroj** jare, HALE estas la unua Asocio en Esperantio, kie estas libera esprimo sen timo, kaj pro tio ni aperigis en la unua paĝo de ĉi tiu magazino la peton de ne haleanoj, escepte de unu, kiuj petis la demision de la aktŭalaj estraranoj. HALE estas la unua Asocio en Esperantio, kie legantoj havos voĉon, balatadon kaj propran estraranon en la estraro de la Asocio.*

*En la venonta kunveno de la estraro mi proponos fari virtualan kongreson per interreto. Ni havos multajn problemojn ĉar estas la unua fojo, kiam en Esperantio okazos kongreso per interreto.*

*La samideanoj, kiu petis nian demision, tamen ne estante haleanoj, havos propran asocion, kaj ekde mia posteno kiel Prezidanto de HALE kaj en la nomo de ĉiuj haleanoj kaj en mia propra nomo mi deziras ke ili havu sukceson per kaj por Esperanto, Nia Kara Lingvo.*

*Ĉiam je via dispono.*

*Johano Antonio  
Cabezas Martínez*

**Remember the Maine! (fino)**

esti malpli gravaj aŭ *patriotisma* ol tiu de Hearst, insistis je la sama temo, plendante per gravaj ĉefartikoloj, ke la mortintoj de la Maine kaj la **honoro** de Usono **devas esti venĝataj**. Pli kaj pli usonanoj konsentis pri tio. Baldaŭ ĉiuj ripetis je la stratoj de Usono ĉie: *Remember the Maine! To hell with Spain*, kaj ni ne pretervidu, ke estis ludovorto ĉi tie, ĉar la angla vorto *main* (ankaŭ dirite *mejn*) signifas *ĉefa afero*, do ĵurnalistoj nenave asertigis la popolon: *Memoru pri la ĉefa afero: sendu Hispanion al la infero!*

Prezidento MacKinley (Makinli) de Usono postulis la registaron de Hispanio, ke estu fino al batalado en Kubo kun la gerilanoj, kaj post iom da hezito, la hispana registaro konsentis. Tamen, Prezidento Makinli petis kaj ricevis de la Kongreso de Usono permeson uzi forton kontraŭ Hispanio por fini la konflikton de Kubo, kio estis formala deklaro pri milito. Ili ne havis veran *oficialan* kaŭzon por milito, tamen ili iris al milito. Baldaŭ admiralo Dewey (Djuj) venkis la hispanan ŝiparon, kiu estis



Prezidento  
MacKinley

en Filipinaj Insuloj, kaj usonanoj komunaj, kiuj ne sciis, kie tiuj insuloj estis, sentis sian patriotismon pligrandigita de tiu novaĵo. Post kvar monatoj, Usono ne nur havis la Filipinajn Insulojn, sed ankaŭ Kubon kaj Porton Riĉan (Puerto Rico, hispane). La “Heroo” de tiu milito estis Teodoro Roosevelt (rusvelt), kiu gvidis la usonan armeon en Kubon, kaj venkis la malmultajn soldatojn hispanajn, kiuj estis tie, malbone ekipitaj, kaj milojn da kilometroj for de siaj hejmoj.

Post la batalo, venis la paco. La Hispana Registaro supozis, ke Usono prenos Kubon, kaj ankaŭ la ŝuldon, kiun ĝi havis, 400 milionojn da dolaroj. Sed Usono rifuzis, kaj akceptis, tamen, Filipinojn kaj Portorikon. Fakte Usono konservis Filipinojn ĝis la fino de la Dua Mondomilito. Ne malbone por la ĉampionoj de libereco. Eĉ Admiralo Djuj plendis al usona Prezidento, ke filipinoj ŝajnas pretigitaj regi sin mem, sed li ne estis rimarkata. Prezidento Makinli plendis, ke *oni kritikis min akre pro*

*Filipinoj, sed mi ne meritas tion... Ili venis al ni kiel donaco de dioj. Ĵurnalista respondis al li, ke li gratulas lin pro tio, ke vi sukcesis civilizigi kaj sendi al Paradizo al pli ol ok miloj da filipinanoj.*

Nun, jarcento post tiu foiro pri barbaraĵo, mensogo kaj sangosoifo, oni ne povas ne demandi sin kion diable Usono volas rakonti al ni pri Irako. Antaŭ cent kvin jaroj estis hispanoj la diableskaj kreitaĵoj —afero, kiun Prezidento José María Aznar devus prikonsideri antaŭ ol tiom senhezite sekvisian karan amikon Buŝ nome de ni ĉiuj—, dum ke nun estas irakanoj. Per la milito de Kubo Usono akiris grandan riĉaĵon kaj pecojn da lando. Nun evidentiĝas, ke ili avidas petrolon irakan. Irakanoj tute fremdas al evento pri la Ĝemelaj Turoj, same kiel la afgana civitanaro. Buŝ plendis de la falo de la turoj, ke terorismo estas la plej granda malamiko de ĉiuj, kaj ke *ĉiu, kiu ne estas kun ni, estas kontraŭ ni*. Sed... ĉu ne evidentiĝas la fakto, ke estas Usono tiu, kiu estas kontraŭ ĉiuj aliaj?

Je la mezo de la jarcento 20-a oni finfine konkludis, ke la katastrofo de La *Maine* okazis, ĉar la armilarejo de la ŝipo estis tre proksime de la motoro —vapura—, kaj pro la varmeco, io eksplodis kaj eksplodigis la ceterajn bombojn, kiuj estis tie. Ne estis kulpo de hispanoj, sed tio ne gravas, kaj fakte ankoraŭ ne gravas. Same kiel ne gravas, ke indianoj ne estis bestoj mortigendaj, tamen la bonaj civitanoj de Usono mortigis ilin kun stultaj pretekstoj. Nun la petrolon de irakanoj Usono avidas.

Pro tio, estas tre brava la ekzemplo de kelkaj usonanoj, kiel Susan Sarandon, kiuj denoncis la mensogojn de sia registaro, asertante publike, ke la Prezidento Buŝ mensogas, kaj ke evitante la militon de Irako oni savos multe da homaj vivoj. Oni devas esti blinda ne kompreni tion. Ni ĉiuj haltu la militon. Ni pruvu niajn “gvidantojn”, ke ili estas misgvidataj, blindaj, mallertaj kaj malsaĝaj. Ne al milito, kaj kiel esperantistoj, ni finfine diru *Ne al glavo sangon soifanta!*



Susan Sarandon

*Isabel Acevedo*

# Jam pagis

kelkaj samideanoj sian jarkotizon.

Ĉiun jaron pagas ĉirkaŭ trideko da esperantistoj sian kotizon al **HALE**, kaj alia nereĝula deko, kiu ne renoviĝas. Oni kutime faras tion laŭ la jaro, eĉ en decembro. Ni petis en la lasta numero de **Kajeroj el la Sudo**, ke oni pagu de januaro, se tio ne ĝenas niajn anojn, ĉar tio vere helpas la farantojn de la magazino, ĉar tiukaze ni mem ne devas antaŭpagi por la farado kaj sendado de la magazino al diversaj partoj de la mondo, kaj ankaŭ por la loĝado de la paĝo en nia interreta sidejo. Ankaŭ estas kamaradoj, kiuj pagas la kotizon de aliaj esperantistoj, kiuj ne povas pagi eĉ 6 eŭrojn, pro tio, ke ili vivas en tre deprimitaj landoj de Afriko aŭ Azio.

Sekve, kelkaj **HALE**anoj jam pagis laŭ la monato de januaro. Ni memoru iliajn nomojn:

Gilberto Ledon  
 Darío Rodríguez López  
 Antoine Ribas  
 Pedro Sanz Sanz  
 Giordano Moya Escayola  
 José Antonio Fleta Zaragozano  
 José Pina Tuells  
 Juan Antonio Cabezos Martínez  
 Jesuo de las Heras Jiménez  
 Adolf Vesely  
 José María Bernabéu Franco.

Interese estas, ke kelkaj samideanoj ne uzis bankon tiucele, sed normalan koverton kun letero, ene de kiu venis

bileto de 10 eŭroj. Ankaŭ, estas kelkaj samideanoj, kiuj pagis por kvin jaroj. Tio estas konvene al ni, kaj ankaŭ al li, ĉar se la prezo de la kotizo plialtiĝos, ni respektos la pagon, tio estas, ni ne petos pli da mono. Ni diru, ke limo al tiu antaŭpago, estu kvin jaroj. Se samideano deziras pagi pli, ekzemple, 150 eŭrojn, ni komprenos, ke li antaŭpagas kvin jarojn, kaj la cetera sumo estas donaco por apogo al nia ideo, se li mem ne avertas nin pri tio, ke la tuto estas donaco.

Sed tio punas sendantojn, ĉar ne eblas pagi ĝuste ses eŭrojn per tiu malnova, plej malmultekosta maniero. Mi proponis en la lasta kunveno de la Estraro de **HALE**, ke oni plialtigu la kotizon al 10 eŭroj jare, por tio, ke ĉiuj kamaradoj pagu same. Sed mia ideo ne estis plenplene akceptata, male, ĝi estis diskutata kaj malaprobata pro tio, ke plialtigo de kotizo je 40 procento ŝajnas troa. Anstataŭe, oni aprobis alian ideon, **malplialtigi** la kotizon al **5 eŭroj!** Dekomence mi kontraŭis, sed finfine konvinkis min la klareco de la argumento: ankaŭ estas monbileto de 5 eŭroj, kaj sekve tiuj, kiuj sendas la kotizon per simpla koverto ne plu estas diskriminaciataj, unu eŭro ne estas diferenco, kaj **HALE**ano daŭre povos sendi donacojn al la asocio, same kiel ili faris de ĝia fondiĝo. Fakte, ĉiujare kelkaj el niaj kamaradoj sendas 30 aŭ 36 eŭrojn donace al la asocio. Tio ebligas, ke ni povas pagi la kostojn de la eldono kaj sendado de la magazino, kaj ankaŭ la pagon de la sidloko en Interreto.

Aliflanke, ankaŭ kelkaj kamaradoj pagis por venontaj jaroj. **HALE** ne havas

sufiĉe da mono por krei kategorion de *Dumvivaj Membroj*, sed eblas pagi kelkajn jarojn samtempe. Ni diru, ke limo de kvin jaroj estas interesa mezpunkto, ĉu ne? Do, se kamarado volas pagi kelkajn jarojn antaŭe, li aŭ ŝi povas pagi du (10 eŭrojn), tri (15 eŭrojn), kvar (20 eŭrojn) aŭ kvin (25 eŭrojn) jarojn samtempe. Se ni ricevas monkvanton pli grandan ol 25 eŭrojn, ni komprenos, ke la cetera monsumo estas donaco al HALE. Ĉio plialtiĝas mone hodiaŭ, sed ni fidas je solidareco kaj ni, male, malplialtiĝas kotizon. Ni ne deziras distingi pagipovajn kaj nepagipovajn landojn, same kiel UEA kaj aliaj burĝaj asocioj faras. Ni kredas je solidareco, kaj per diskreta kotizo ni klopodos daŭrigi nian servon al nia eta komunumo laborista loĝante en Hispanio kaj eksterlande. Se anoj kaj simpatiantoj deziras kontribui per pli alta sumo, tio estu ilia privata iniciato. Ni diros ĉi tie pri ili, aŭ silentos la aferon, laŭ ilia bonvolo. Kaj se per la mono, kiun ni ricevos, ni ne plu povos pagi niajn kvitancojn, ni devos bedaŭrinde renonci havi senreklaman sidejon en Interreto unue, kaj poste ni malplimultigos la nombron de niaj paĝoj..., kaj se necese ni ĉesos aperi surpapere. Sed ni ne malaperos.

La skipo, kiu pretigas la *Kajerojn* — ne sole mi faras tion, ankaŭ Jozefo Pina helpas, kaj ankaŭ estas multe da aliaj esperantistoj, kiuj sendas artikolojn por publikigo..., ni pensu pri John Hammer, Giordano Moya, Adolf Vezely, Marco Botella, Olga López, Aŭgusto Casquero, Isabel Acevedo, Mari-France Conde Rey, François Hounsounou, Pedro Garrote,

Darío Rodríguez, Anĝelo Lamanna, Dubo, Julinka Litvinova, José María Galofré Domingo, Johano Antono, Jakvo Ŝram, Vladimir Kilda Borhoves, Toloyen, Annice Szrajbman, Joao Manoel Aguilera Junior, Matías, Marteno Bustin..., por citi nur tiujn, kiuj sendis artikolojn por publikigo en la lastaj du jaroj!—; nu, tiu aro da homoj, kiuj kunlaboras en nia magazino ne estos silentataj nur pro mona kaŭzo. Ni ĉiam havos nian esprimilon, nian magazinon *Kajeroj el la Sudo*, dum ke ni havos legantojn, eĉ se ni ne havas monon. La kontribuajoj de niaj amikoj estas tre altkvalitaj, eĉ se ne kongruaj inter si kaj ne malofte estas polemikoj kaj malinterkonsentoj. Tia estu vivo! Eble estu notinde, ke nia magazino premiis aŭtoron, kiu tre akre kontraŭis la politikon de la magazino! Sed Pri tio vi jam legis en paĝo 7-a. Mono estas nur materio, sed ideoj estas la vivo de magazino, kaj pri tio, mi vidas, ni ne havas mankon. Almenaŭ en la antaŭvidebla ostempo. Ni tostu je la longa vivo de *Kajeroj el la Sudo*!



# STATUTO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

**Art. 1.-** Sub la nomo *Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj* (HALE) estas fondita Asocio kiu celas:

1. Disvastigi kaj instrui la universalan lingvon Esperanton en ĉiuj laboristaj medioj, sen atenti pri siaj partipolitikaj tendencoj kaj nur konsiderante sian nepran inklinon al demokrataj kaj progresemaj ideoj.
2. HALE ne estante partipolitika sed nur kleriga, eduka kaj kultura organizo, laŭ ĝi deklaras en la antaŭa paragrafo, celas ankaŭ, ke Siaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la diversaj politikaj opinioj sur kiuj sin apogas la sindikatmovadoj, kaj instigos malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon kiun ili ricevas en siaj apartaj medioj.
3. Kohera kun la antaŭaj paragrafoj, HALE identiĝas al la principoj kaj celoj de SAT (Tutmonda Asocio de Esperantistaj Laboristoj), Parizo.

**Art. 2.-** La sidejo de la Asocio estas la urbo kie la Prezidanto loĝas, kaj kies adreson oni trovas je la dua paĝo de la tiama *Kajeroj el la Sudo* kaj ĝi submetiĝas al la hispana aktuala Leĝo

de Asocioj kaj al la spirito kaj tekstoj tiurilate de la demokrata Hispana Konstitucio.

**Art. 3.-** Tiu ĉi Asocio, kies agadkampo disetendiĝas al la tuta Hispanio, povas interrilatigi, post decido de Ĝenerala Eksterordinara Kunsido, al Internaciaj Grupoj, Asocioj aŭ Federacioj kies celoj koincidas kun tiuj de tiu ĉi Statuto, por plifirmigi kaj pliefikigi nian propran agadon.

## PRI ĜIAJ MEMBROJ

**Art. 4.-** Povas aparteni al la Asocio kiel membroj: esperantistoj, lernantoj aŭ simplaj simpatiantoj, kiuj, interesataj pri la celoj de la Asocio kaj akceptante ĉi tiun Statuton, petos sian aniĝon al ĝi a

Prezidanto.

**Art. 5.-** Ĉiu membro rajtas voĉdoni en la Ĝeneralaj Kunsidoj, kaj povos esti elektata por okupi postenon en la Estraro.

**Art. 6.-** La membroj perdos siajn rajtojn, kaj eĉ oni povos ilin eksigi, pro





justa kaŭzo, se eblas antaŭaŭdante ilin. Povas esti kaŭzo de eksigo:

1. Rea nepago de la asocia kotizo.
2. Ofendo aŭ nerespektema konduto rilate la aliajn membrojn.
3. Malobeo de tiu ĉi Statuto. Pri tiu decido oni devas informi poste al la Ĝenerala Kunsido por ĝia eventuala konfirmo.

### PRI ĜENERALAJ KUNSIDOJ

**Art. 7.-** Plej alta decida organo de la Asocio estas la Ĝenerala Kunsido, al kiu submetiĝas ĉiuj ceteraj. Ordinara Ĝenerala Kunsido devas okazi almenaŭ unufoje dum la jaro. La precizan daton fiksis la Estraro, kaj en ĝi oni prezentos al la anaro la situacion de la Asocio tiel ekonomian kiel koncernan al la intereshavaj okazintaĵoj en la finita jara ciklo. La membroj ne partoprenantaj tiun Kunsidon ricevos informon pri ĝi.

**Art. 8.-** Tiuj ĝeneralaj Kunsidoj okazos, prefere, en la kadro de propra Kongreso, kaj se tio ne estus eble pro atentinda malhelpo, oni okazigos ilin profitante la kadron de nacia aŭ internacia kongreso.

**Art. 9.-** Se oni ne trovas la adekvatan lokon por okazigi tiun Ĝeneralan Kunsidon, la estraro organizos Referendumon konsistanta voĉdonilo, per kiu ĉiu memb voĉdonos por aŭ kontraŭ la listo de proponitaj estraranoj.

**Art. 10.-** La Ĝeneralaj Eksterordinaraj Kunsidoj povas esti alvokitaj de la estraro, se ĝi taksas tion necesa; aŭ de minimumo da 15% el l

membroj per prezento de skribaĵo kun la koncernaj subskriboj, antaŭmetante resumon de la motivoj pro kiuj oni deziras la alvokon. Ĝeneralaj Kunsidoj, ĉu ordinaraj, ĉu eksterordinaraj, estos kunvokitaj almenaŭ dudek tagojn antaŭe, per cirkulero al ĉiuj membroj. Ĉe la Ĝeneralaj Ordinaraj Kunsidoj oni decidas laŭ simpla plimulto, kaj ĉe la Ĝeneralaj Eksterordinaraj Kunsidoj decidias plimulto de du trionoj de la voĉdonintoj ĉeestantaj aŭ skribe reprezentataj. Nepre la ĝeneralaj Eksterordinaraj Kunsidoj estos alvokitaj, laŭ nuna ŝtata leĝo, ĉiam kiam la traktotaj afero estu:

1. Promocio de estraro.
2. Modifo de tiu ĉi Statuto.
3. Akiro kaj senigo de havaĵoj.
4. Starigo de Federacioj aŭ enskribado en ili.
5. Peto pri deklaro de publika utilo.
6. Ratifi eksigon de membro proponita de la Estrato.
7. Disigo de la Asocio.

### PRI LA ASOCIA ESTRARO

**Art. 11.-** Direktanta kaj administranta organo de tiu ĉi Asocio estas la Estraro. Tiu ĉi kunordigas kaj disvolvas la bazajn



taskojn por kiuj estis kreita la Asocio. Ĝi aranĝos kaj prezentos ĉiujare la ordinarajn kaj eksterordinarajn buĝetojn same kiel la asocian bilancon por eventuala aprobo de la Ĝenerala Kunsido.

La Asocia Estraro konsistas el Prezidanto, Vicprezidanto, Sekretario, Kasisto kaj unu Delegito por ĉiu hispana regiono reprezentante la membrojn de siaj respektivaj aŭtonomaj teritorioj.

*La sidejo de la Asocio estas la urbo kie la Prezidanto loĝas, kies adreson oni trovas je la dua paĝo de la tiama **Kajeroj el la Sudo*** La elektoj de la Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto fariĝos inter la membroj apartenantaj al HALE dum antaŭ pli ol unu jaro, kaj fakte ili estos la gvida aparato kiu direktos kaj administros la societon.

La estraro elektos **Vicprezidanton**, kiun la sekvonta asembleo ĝenerala devos aprobi. Sia ofico daŭros tiel, kiel tiu de la estraro.

Al la dirita Estraro apartenos ankaŭ kiel konsilanto la SAT-peranto ĉe nia lando.

#### Koncernas la Prezidanton:

a. Prezidi la estrarajn, ordinarajn kaj eksterordinarajn ĝeneralajn kunsidojn indikitaj en tiu ĉi Statuto, kaj kunvoki ilin.

b. Reprezenti la Asocion en ĉiuj oficialaj, sociaj, juraj aŭ alispecaj agoj.

c. Liveri la societajn pagordonojn kaj ekzameni ĉiujn ĝiajn kontojn kaj validigi ilin per la propra subskribo.

d. Konfirmi la asociajn decidojn kaj ĉiujn dokumentojn kiujn iamaniere entenas rajtojn favorajn aŭ devojn kontraŭ la Asocio.

e. Efektivigi la taskojn delegitajn de la Estraro aŭ Ĝeneralaj kunsidoj.

#### Koncernas la Vicprezidanton:

1. Anstataŭi la prezidanton,

2. Ĉian alian taskon konsentitan inter li/ŝi kaj la Prezidanto.

#### Koncernas la Sekretarion:

a. Certigi ĉe la aktolibro pri la decidoj de la Estraro kaj la Ĝeneralaj kunsidoj, subskribante ilin kune kun la Prezidanto.

b. Liveri ĉiuspecajn dokumentojn kiuj, kun la subskribo de la Prezidanto, devas reprezenti, rajtigi aŭ esprimi iamaniere la kriterion de la Estraro aŭ de la Asocio mem rilate al ĝia ĝenerala malvolvo aŭ al iu specifa afero.

c. Organizi kaj gardi la arkivon kaj la asocian dokumentaron.

#### Koncernas la Kasiston:

a. Gardi la asocian monhavon, kiu devas resti en bankkonto je la nomo de la Asocio.

b. Enspezi en la diritan bankon la ricevitajn kotizojn de la membraro, kaj pagi la kvitancojn kaj ceterajn pagojn de la Asocio.

c. Registri la enspezojn, elspezojn kaj saldojn de la Asocio. Ŝ/Li periode informos la Estraron pri la ekonomia situacio de la societo, kaj starigos bilancon je la fino de ĉiu jaro.

Koncernas la aliajn estraranojn:

- a. Tiuj, kiuj havas vicajn postenojn funkcios per delegoj de la koncernaj respondeculoj kaj anstataŭos ilin okaze de foresto aŭ malsano.
- b. Ili kunlaboros en la gvida tasko de la Asocio.
- c. La cititaj taskoj por ĉiu posteno ne devas esti konsiderataj kiel unikaj, nek ili pretendas enteni ĉiujn realigotajn aktivecojn; ili estas ja nur ekzemplaj kaj bazaj indikoj.

**Art. 12.-** La estraraj postenoj estos asignataj dum Ĝeneralaj Kunsidoj, ili estas senpagaj kaj renovigeblaj laŭ decido en tiuj kunvenoj.

Monaj rimedoj:

**Art. 13.-** La fondiĝa propraĵo de la Asocio estas ne ekzistanta, kaj la ĉefa subtenrimedo por ĝi estas la kotizoj de la anaro. La kvanto de tiu kotizo estu starigita de la Estrara Kunsido kaj submetita al la koncerna aprobo de ĝenerala Ordinara Kunsido. Tiun ĉi normon oni sekvas en ĉiu nova modifoj de la diritaj kotizoj laŭ ekonomiaj ĉiumomentaj bezonoj. Se iu membro deziras plialtigi la propran kvoton, tiu plialtigon oni konsideros kiel donaco. Laŭ sama koncepto donaco oni akceptos la oficialajn kontribuojn kaj eksterordinarajn privatajn alportojn.

Eventuale la Estrara Kunsido povos esceptigi de la kotizpago aŭ redukti ĝin al tiuj membroj kiuj, pro malfavoraj cirkonstancoj, ne facile povos ĝin pagi.

**Art. 14.-** Ne posedante propran havaĵaron, tiu ĉi Asocio devas aĝustigi

sian buĝeton jaran al la monrimedoj de siaj enspezoj, fiksante kiel limokvanton de tiu buĝeto 90.000 pesetojn.


Pri propra revuo kaj eldona fako:

**Art. 15.-** Kiam la nombro da membroj kaj la ekonomiaj eblecoj de la Asocio tion permesos, la Asocio publikigos bultenon kiel oficialan organon de la socio. En ĝi oni uzos la Esperantan Lingvon, kaj oni publikigos literaturajn artikolojn, priesperantistan propagandon, aŭ prilaboristajn temojn.

La Asocio ankaŭ projektas starigi Eldonan Fakon kiu entute sekvas similan linion al tiu de sia bulteno kaj celos disvastigi tiujn principojn fundamentajn de la Asocio.

Pri ĉeso kaj likvido:

**Art. 16.-** Tiu ĉi asocio ne povas malestiĝi sene de antaŭa decido de Ĝenerala Eksterordinara Kunsido. Se oni



Kleriga, diskutiga, informiga bulteno nia!

decidus tiel, oni nomigu likvidan komisionon kiu, fininte sian administran laboron, se ekzistus pozitiva saldo, liveru ĝin al Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kaj se tio ne estus ebla, al la Hispana Esperanto Federacio.

*Fondita je Aŭgusto de 1986,  
kaj reformita la sepan de  
februaro de 1997*



HALEanino parkeras la statuton.

## Laŭdo al blanka papero

Kiom kostas papero blanka? Malmulte, praktike nenion. Neniu homa esto iam ekhaltis pensi pri simpla papero, miri ĝin, senti, ke ĝi mankas al li aŭ ŝi, kiam ne plu estas. Inter papero kun subskribo de la plej bonaj pilkoludistoj de la lastaj cent jaroj kaj blanka papero, kiun oni preferu? Nu, mi preferas la duan.

Nek la *Esti aŭ ne esti*, de Ŝekspir, nek la *En loko de Manĉo...*, de Servanteso, povas kompariĝi al blanka papero. Ĉar perfekta verko tute ne ekzistas, kaj teksto perfekta ne ekzistas aŭ estos iam elpensita; sed la fakto elepensi ja estas perfekta. Sur papero blanka oni povas esprimi tion, kion oni sentas, tion, kion oni vidas aŭ oni dezirus vidi... Verki estas revii, flugi.

Iam oni elpensis maloportunan ŝercon: «Kio estas blanka papero? Ĉu rajtoj de virino?» Nu, estu tiel, ke ĉiu homo rajtu blankan paperon je la sama grando. Pro tio, kaj pro ĉio, kion mi nun forgesas, pro tio, ke tiu ĉi mia estas neperfekta teksto: blanka papero estas libereco mem.

*Toloyen*  
18 9 2002

# Ĉe la sennaciuloj

Laŭ Eŭgeno Lanti *sennaciulo* estas homo, kiu ne nur aprobas sennacii-



mon, sed pli sukcesis senigi sin je prefero por la lando, kie li naskiĝis kaj kies civitano jure kaj devige li estas; homo kiu havas geamikojn en ĉiuj mondpartoj

kaj sopiras jen al Berlino, jen al Buenos Aires, jen al Moskvo, jen al Parizo, jen al Stokholmo, jen al Tokio, ktp.: homo, kiu scipovas pli bone Esperanton ol sian gepatran lingvon.

Iam en la jaro 1950 aŭ 1951, kiam mi vivis en la franca urbo Le Creusot, kaj laboris tie ĉe fandej-forĝeja uzino, ni havis en nia ĉambro junan esperantiston, Sobota, el Slovakio. Antaŭ sia forveturo, li donacis al mi *Kliĉ jazyka esperanto* (ŝlosilon de Esperanto por ĉeĥoj), kaj du adresojn de esperantistaj organizoj. Iu franco luis al mi sian montardomon izolitan en arbaro kaj tie mi komencis lerni nian lingvon.

Helpe de la ŝlosilo mi skribis du leterojn, unu al UEA en Londono, la duan al iom stranga adreso *Sennaciulo* en Parizo, kaj kun senpacienco mi atendis la respondojn. Post kelkaj tagoj mia letero al Britio revenis kun mencio, ke tiu asocio jam ien transloĝiĝis. Sed el SAT-oficejo krom letero alvenis ankaŭ gazeto, kiun mi tuj abonis kaj librokatalogo, laŭ kiu mi mendis libron *Manifesto de la sennaciiistoj*, kiu poste fariĝis mia sola lerno-libro.

Kompreninte ĉion, mi rememoris, kion rakontis al mi mia patro dum mia infanaĝo,

kaj trovis, ke la ideoj de Lanti kaj de mia patro estis preskaŭ samaj, kvankam la patro ne estis esperantisto.

En la jaro 1953 mi aliĝis al SAT. En la sama jaro trafis min grava akcidento kaj pro miaj kripliĝintaj piedoj mi decidis la 4-an de januaro 1956 enpleniĝi mian valizeton kaj forveturi al Parizo. Post senhejmeca periodo kaj havinte diversajn laborokupiĝojn, mi komencis labori kiel metia prizorgisto en la granda hotelo Ambassador, deĵorante nur nokte, sen ia ajn escepto (ekde aŭgusto 1959 ĝis majo 1963).

Tio estis por mi la plej ĝuinda periodo de mia vivo, ĉar libran tagon mi povis fruktedone uzi laŭ mia plaĉo. Forlasinte matene la hotelon, unue mi preskaŭ ĉiam iradis al SAT-oficejo por babili aŭ helpi al niaj amikoj Banje kaj Bartelmes. Nur posttagmeze mi enlitiĝis. Ĉiusabate okazis grupkunvenoj en la Laborborso, kaj ĉiudimanĉe mi renkontiĝadis ĉe mia amikino Susana, kiu nin gastigis en sia Meudon-arbaro. Venadis ankaŭ pluraj alilandanoj kaj neniu krokodilis.

Prave iam skribis Zamenhof en letero al Kofman (1901): *Se eĉ ĉiuj akademioj de la mondo akceptus Esperanton..., nenio garantias, ke en la daŭro de unu jaro ĝi subite ne estos forĵetita kaj forgesita por eterne! Lingvo internacia fortiĝos por ĉiam nun en tia okazo, se ekzistas grupo da homoj, kiuj akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, heredan.*

SAT ĝuste celas konsistigi tian homan grupon.

*Adolfo Veseleý (cz)*

# ZAMENHOFA TAGO EN BYDGOSZCZ (POLLANDO)

La 15an de decembro, kiel jam tradicie, oni festis en Bydgoszcz la datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof. Partoprenis la aranĝon homoj el diversaj landoj (Pollando, Albanio, Demokratia Respubliko de Kongo, Litovio, Mongolio, Hispanio, kaj aliaj).

Malfermis la aranĝon s-ro Andrzej Grzebowski, kiu rememorigis al ĉiuj pri la signifo de tiu Tago, tiel grava kaj emociplena por ĉiu samideano. Poste okazis diversaj artaj prezentadoj, kiel deklamado de litova poemo en Esperanto far Aurelja Masalaite, litova studentino de la Internacia Studumo.

Tri kongaj samideanoj, ankaŭ studentoj, Moliere, Blaise kaj Alojz kantis en la internacia lingvo diversaj kantoj kaj dancis samtempe. La konata membro de la kantensemblo «Anda», Pawel, kantis kaj gitaris kelkajn pecojn en Esperanto, varme akompanata de la studentaro. M o n g o l o Tumor kantis m o n g o l a j n kantojn, akompanata ĉegitare de samlandano Ĉ i k o . Gestudentoj de

la hispana lingvo kuraĝis kanti, en la hispana, la moda kanto «Asereñe». Okazis lotumado de donacoj, humuraĵoj, abunda manĝado kaj trinkado, inter alie de «sangría», preparita de la profesoro Augusto Casquero helpata de la gestudentoj, kaj fermo pere de la komuna kantado de la kristnaska kanto «Paca Nokt'» sub la gvido de profesorino Mirka Korniluk.

Tuta aranĝo estis organizita kaj direktita de la geprofesoroj de la Studumo Aneta Bedkowska kaj Augusto Casquero.

*Augusto  
Casquero*



# La Tago de Zamenhof

La lastan 15-an de decembro, ni renkontis en restoracio de Alikanto, proksime de la loko, kie okazis la lastan julion la kongreso de SAT kaj la lastan aŭguston tiu de HEF.

La manĝado estis bona, tamen la servado estis malbona, ĉar ni devis atendi de la dua kaj duono ĝis dek minutoj post la tria por komenci manĝi. Tamen, la kunesto estis agrabla kaj ni multe parolis esperante kaj pri Esperanto. Ne pri la lastaj aferoj politikaj, kiuj tinturis la bonajn rilatojn inter kelkaj esperantistoj tie kunmanĝantaj, tamen. Verŝajne estis paŭzo, kaj multe da civilizo inter ni.

Je la fino de la manĝado, kiel kutime, ni disdonis la premion *Tago de Zamenhof*, kiun



ĉijare gajnis du elstaraj artikoloj: *La Esperanta Civito*, de Marie-France Conde-Rey, kiun oni povas legi en nia numero 55-a (ankaŭ je <http://storm.prohosting.com/jesuo/k55-civito.htm>) kaj *Akra reago*, de Jakvo Schram, publikigita en la *Kajero* 53-a

(<http://www.iespana.es/Esperanto/k53akra.htm>). La unuan ni premiis pro tio, ke ĝi estas rekta informo pri afero, pri kiu

multaj esperantistoj parolas, sed kiun neniu vere vidis li aŭ ŝi mem. Do ni jam scias, kaj sekve nia opinio pri la afero estas kompetenta. Krome, oni scias pri kiu povas informi rekte kaj vere pri tiu afero.



Ĉiun jaron ni distingas nur unu artikolon, sed ĉi tiun ni ankaŭ volis premii la kuraĝon protesti, kritiki, kaj defendi sian propran opinion, eĉ se ne prava. Ni diru, ke kritiki estas homa, pravi estas dia, kaj ĉar ne estas praktike tio, ke oni povu postuli al ni, ke ni estu diaj, almenaŭ ni havu la kuraĝon esti homaj ☺. Kiam ni disdonis tiun ĉi premion al kunmanĝantoj, la Prezidanto de HALE diris, ke tio estu omaĝo al sendependa penso, kaj per tio ni agnoskas, ke nia asocio estas viva, ĉar (a)socio, kie ne estas kritiko, estas (a)socio mortinta, aŭ malsana.

Post kelkaj horoj de amika kunesto, ni ĝisis kaj iris al niaj okupoj, esperante renkonti denove la venontan jaron, en Mursjo.



# La Faraono

## ĈAPITRO VIII

La princo revenis ĉagrenita en sian domon kaj alvokis la adjutanton.

— Vi devas instrui min — diris Ramzes — kiel oni trovas monon...


— Ah! ah!... — ekridis la elegantulo. — Jen estas scienco, kiun oni ne instruas en la plej altaj pastraj lernejoj, sed en kiu mi povus esti profeto...

— Tie oni instruas ne prunti monon — interrompis la princo.

— Se mi ne timus malpurigi miajn lipojn per malpiaj vortoj, mi dirus, ke multaj pastroj perdas la tempon... Malfeliĉaj homoj, kvankam sanktaj!... Ili ne manĝas viandon, kontentiĝas per unu edzino, aŭ tute evitas la virinojn kaj... ne scias, kio estas pruntepreni... Mi estas kontenta, Ramzes — predikis Tutmozis, — ke vi ekkonos ĉi tiun sciencon per miaj konsiloj. Jam hodiaŭ vi komprenas, kiajn dolorojn kaŭzas manko de l' mono. Homo, kiu bezonas monon, ne havas apetiton, vekigatas subite dum la dormo, rigardas la virinojn kun miro, kvazaŭ demandante: «Por kio ili estas kreitaj?...» En plej malvarma templo lia vizaĝo brulas, kaj en plej granda varmeĝo, en la dezerto, li sentas frostotremon. Li rigardas antaŭen kiel frenezulo, ne aŭdas, kion oni diras al li, iras plej ofte en peruko turnita posten kaj forgesinte parfumi ĝin, kaj trankviliĝas nur apud kruĉo da forta vino, kaj por ne longa tempo. Ĉar apenaŭ li reakiris la sentojn, li rec

sentas, ke la tero kvazaŭ malfermiĝas sub liaj piedoj...

— Mi vidas — daŭrigis la elegantulo — per via maltrankvila pasado kaj senorda svingado de l' manoj, ke en la nuna momento vi sentas malesperon pro manko de mono. Sed baldaŭ vi eksentos ion alian, kvazaŭ oni demetus de via busto la grandan sfinkson. Poste lulos vin la dolĉa forgeso pri la antaŭaj embarasoj kaj nunaj kreditoroj, kaj poste... Ah, feliĉa Ramzes, atendas vin eksterordinaraj surprizoj!... Ĉar kiam pasos la templimo, kaj la kreditoroj komencos vin viziti je preteksto honori vin, vi estos kiel cervo, persekutata de



Ramzes' la 2-a



hundoj, aŭ kiel egipta knabino, kiu ĉerpante akvon ekvidos la tuberoplanan dorson de l' krokodilo...

— Ĉio tio ŝajnas tre gaja — interrompis Ramzes ridante, — sed ne alportas eĉ unu draĥmon...

— Ne finu! — interrompis Tutmozis. — Tuj mi iros alvoki la fenician bankieron Dagonon, kaj hodiaŭ vespere, eĉ se li ne donos al vi ankoraŭ monon, vi rekiros la trankvilon.

Li elkuris, saltis en malgrandan portilon kaj ĉirkaŭita de l' servistoj kaj de l' junuloj same senkonsideraj malaperis en la aleoj de l' parko. Antaŭ la subiro de l' suno venis en la domon de la kronprinco la Feniciano Dagon, la plej granda bankiero de Memfiso. Li estis homo en la plej forta aĝo, flava, seka, sed bone konstruita. Li portis bluan tunikon, blankan mantelon el delikata ŝtofo, riĉajn proprajn harojn kunigitajn per ora ringo kaj grandan, nigran barbon, ankaŭ naturan. Ĉi tiuj densaj haroj havis imponantan aspekton apud la perukoj kaj malnaturaj barboj de la egiptaj elegantuloj.

En la loĝejo de la kronprinco svarmis aristokrata junularo. Unuj malsupre sin banis kaj oleis, aliaj ludis ŝakojn kaj damojn, aliaj en societo de dancistinoj trinkis sur la teraso sub tendoj. La kronprinco ne trinkis, ne ludis, ne parolis kun virinoj, sed paŝis sur unu flanko de l' teraso, malpacience atendante la Fenicianon. Kiam li ekvidis lin en la aleo, en portilo portata de du azenoj, li malsupreniris en la unuan etaĝon, kie estis neokupita ĉambro.

Post momento en la pordo aperis Dagon. Li ekgenuis sur la sojlo kaj ekkriis:

— Mi salutas vin, nova suno de Egipto!... Vivu eterne, kaj via gloro atingu la malproksimajn bordojn, kien penetras la feniciaj ŝipoj...

Laŭ ordono de l' princo li leviĝis kaj parolis kun vivplenaj gestoj:

— Kiam la nobla Tutmozis haltis antaŭ mia terdomo (terdomo estas mia loĝejo kompare kun viaj palacoj, erpatre!), tia brilo radiis de lia vizaĝo, ke tuj mi ekkriis al mia edzino: — Tamaro, Tutmozis venas ne en sia propra nomo, sed de iu pli alta, kiel Libano estas pli alta ol la apudmaraj sabloj... Kaj mia edzino demandas: — Kial vi pensas, ke la altranga Tutmozis venas ne en sia propra nomo?... — Tial, ke li ne povas veni kun mono, ĉar li ne havas ĝin, kaj li ne venis por preni monon, ĉar mi ne havas ĝin... En tiu momento ni ambaŭ salutis vian adjutanton. Kaj kiam li diris al ni, ke vi, vi alta sinjoro deziras dek kvin talentojn de via sklavo, mi demandis la edzinon: Tamaro, ĉu mia koro ne bone antaŭsentis? — Dagon, vi estas tiel saĝa, ke vi devus esti konsilisto de la kronprinco.

Ramzes bolis de malpacienco, sed li aŭskultis la bankieron... Li, kiu ribelis en la ĉeesto de l' propra patrino kaj de l' faraono.

— Kiam ni — daŭrigis la elokventa Feniciano — konsideris kaj komprenis, ke vi, sinjoro, deziras miajn servojn, en nia domo ekregis tia ĝojo, ke mi ordonis doni al la servistoj dek kruĉojn da biero,

kaj mia edzino ordonis, ke mi aĉetu al li novajn orelingojn. Mia ĝojo estis tiel granda, ke veturante al vi mi ne permesis al la veturigisto bati la azenojn. Kaj kiam miaj malindaj piedoj tuŝis vian plankon, princo, mi demetis de mia fingro oran ringon (pli grandan ol tiu, kiun lia ekscelenco Herhor donis al Eunana) kaj mi donacis ĉi tiun ringon al la sklavo, kiu verŝis akvon sur miajn manojn. Kun permeso de via ekscelenco, de kie estas la arĝenta kruĉo, el kiu oni verŝis la akvon?...

— Ĝin vendis al mi Azario, filo de Gaber, por du talentoj.

— Hebreo?... Via ekscelenco komercas kun Hebreoj? Kaj kion diros pri tio la dioj?...

— Azario estas komercisto, kiel vi — respondis la kronprinco.

Aŭdinte tion, Dagon kunpremis sian kapon per du manoj, komencis kraĉi kaj ĝemi:

— Ho Boal Tammuz!... ho Baalet! ho Astoret!... Azario, la filo de Gaber, Hebreo, estas tia komercisto, kiel mi? Ho miaj piedoj, kial vi alportis min ĉi tien?... Ho koro, pro kio vi suferas tian doloron kaj mokon?... Plej nobla princo — kriis la Feniciano — batu min, fortranĉu al mi la manon, se mi falsos la oron, sed ne diru, ke Hebreo povas esti komercisto. Tiro malaperos, la lokon de Sidono okupos sablo, antaŭ kiam Hebreo fariĝos komercisto. Ili povas melki siajn malgrasajn kaprinojn, aŭ sub la egipta vipo miksi pajlon kun argilo, sed neniam komerci. Tfu!... tfu... malpura popolo de sklavo!... Rabistoj, ŝtelistoj!...

En la koro de l' princo, oni ne scias kial, ekbolis kolero, sed tuj li trankviliĝis. Tio ŝajnis stranga al Ramzes mem, ĉar ĝis nun li neniam opiniis necesa sin detenadi.

— Do — diris subite la kronprinco, — ĉu vi pruntos al mi, honesta Dagon, dek kvin talentojn?

— Ho Astoret!... dek kvin talentojn?... Tio estas tiel granda ŝarĝo, ke mi devus sidiĝi, por bone pripensi.

— Sidiĝu do.

— Por unu talento — daŭrigis la Feniciano — komforte sidiĝante sur seĝo — oni povas havi dudek orajn ĉenojn, aŭ sesdek belajn laktantajn bovinojn, aŭ dek sklavojn por la laboro, aŭ unu sklavon, kiu scias ludi fluton, aŭ pentri, eble eĉ kuraci. Talento estas terura riĉaĵo!...

La okuloj de l' princo ekbrilis.

— Se do vi ne havas dek kvin talentojn... — interrompis la princo.

La terurita Feniciano subite deglitis de l' seĝo sur la plankon. — Kiu en ĉi tiu urbo ne havas monon — ekkriis li — se vi ordonas, filo de l' suno?... Estas vero, ke mi estas mizerulo, kies oro, juveloj kaj ĉiuj lubienoj ne valoras vian ekrigardon, princo. Sed se mi rondiros al niaj komercistoj kaj diros, kiu min sendis, antaŭ la morgaŭa tago ni trovos dek kvin talentojn, eĉ se ni devus elfosi ilin el la tero. Se vi, erpatre, stariĝus antaŭ seka figarbo kaj dirus: “Donu monon!”, la arbo pagus tributon. Nur ne rigardu min tiel, filo de Horus, ĉar mi sentas doloron en la fundo de l' koro kaj

mia prudento malklariĝas — diris la Feniciano per peteganta voĉo.

— Sidiĝu, sidiĝu... — diris la princo kun rideto.

Dagon leviĝis de l' planko kaj ankoraŭ pli komforte sidiĝis sur la seĝo.

— Por kiel longa tempo la princo deziras dek kvin talentojn? — demandis li.

— Kredeble por unu jaro.

— Ni diru tuj: por tri jaroj. Nur lia sankteco povus redoni dek kvin talentojn en la daŭro de unu jaro, sed ne juna princo, kiu devas ĉiutage akcepti gajajn nobelulojn kaj belajn virinojn... Ah! ĉi tiuj virinoj. Ĉu estas vero, kun permeso de via ekscelenco, ke vi prenis en via domon Saran, la filinon de Gedeono?

— Kian procenton vi postulas? — interrompis la princo.

— Bagatelon, pri kiu via sankta buŝo ne bezonas paroli. Por dek kvin talentojn, vi donos, princo, po kvin talentojn jare, kaj en la daŭro de tri jaroj mi mem reprenos ĉion, tiel ke via ekscelenco eĉ ne rimarkos...

— Ĉu vi donos al mi hodiaŭ dek kvin talentojn, kaj post tri jaroj vi reprenos tridek?

— La egipta leĝo permesas preni procenton, egalan al la pruntita sumo, — respondis konfuzite Dagon.

— Ĉu tio ne estas tro multe?

— Ĉu tro multe? — ekkriis Dagon. — Ĉiu granda sinjoro havas grandan kortegon, grandajn riĉaĵojn kaj pagas nur grandajn procentojn. Mi hontus preni malpli de la kronprinco, kaj la princo mem ordonus bati min per bastonoj kaj forpeli, se mi kuraĝus preni malpli...

— Kiam vi alportos la monon?

— Alporti?... Ho dioj! tion unu homo ne povus fari, mi faros pli bone: mi mem pagos ĉiujn elspezojn de l' princo, por ke via ekscelenco ne bezonu pensi pri tiaj mizeraj aferoj.

— Sed ĉu vi konas miajn elspezojn.

— Mi konas ilin iom — respondis malzorge la Feniciano. — Vi volas sendi ses talentojn al la orienta armeo; tion faros niaj



bankieroj de Ĥetem kaj Migdol. Tri talentoj por la glora Nitager kaj tri por la glora Patroklo, tion ni plenumos ĉi tie... kaj al Sara kaj al ŝia patro Gedeono mi povas pagi per la favulo Azario... Pli bone estos tiel, ĉar ili trompus vin en la kalkuloj.

Ramzes komencis malpacience paŝi en la ĉambro.

— Mi do devas doni al vi kvitancon je tridek talentoj? — demandis li.

— Kian kvitancon?... por kio kvitancon?... Kion mi farus kun kvitanco?... Vi ludonas al mi viajn bienojn en la nomoj de Takens, Ses, Neha-Ment, Neha-Pehu, Sebt-Het, Habu.

— Ludoni?... — diris la princo. — Tio ne plaĉas al mi.

— Kiel mi reprenos mian monon, miajn tridek talentojn?...

— Atendu. Mi devas antaŭe demandi intendanton de miaj grenejoj, kiom alportas al mi jare ĉi tiuj bienoj.

— Por kio via ekscelenco faros tian laboron?... Kion scias via intendanto?... Li scias nenion, same certe, kiel mi estas honesta Feniciano. Ĉiujare estas alia rikolto kaj alia enspezo... Mi povas perdi en ĉi tiu afero, kaj tiam la intendanto nenion redonos al mi.

— Sed vi vidas, Dagon, ŝajnas al mi, ke ĉi tiuj bienoj donas pli multe ol dek talentojn da jara profito.


— Vi ne volas konfidi al mi? bone! Se vi ordonos, mi povas lasi la bienojn de Ses... Vi ne estas ankoraŭ certa pri mia

koro? Mi do lasos ankoraŭ la bienojn de Sebt-Het... Sed por kio intendanto. Li instruos al vi saĝon?... Ho Astoret! mi perdus dormon kaj apetiton, se iu intendanto, servisto kaj sklavo, kuraĝus korekti mian grandaniman sinjoron. Ĉi tie estas necesa nur skribisto, kiu skribos, ke via ekscelenco ludonas al mi por tri jaroj bienojn en tiu kaj tiu nomo. Kaj necesaj estas dek ses atestantoj, ke la princo faris al mi tian honoron. Sed por kio la servistoj devas scii, ke ilia sinjoro pruntas de mi monon?...

La tedita kronprinco levis la ŝultrojn.

— Morgaŭ — diris li — alportu la monon kaj alkonduku skribistojn kaj atestantojn. Mi ne volas zorgi pri tio.

— Ah, kiaj saĝaj vortoj! — ekkriis Dagon. — Vivu via ekscelenco eterne!...



## La saŭdado parolas la portugalan (kaj Esperanton)

Mi saŭdadas ĉion, kio markis mian vivon... Kiam mi vidas fotojn, kiam mi flaras, kiam mi aŭdas voĉon, kiam mi memoras la pasintecon, mi saŭdadas... Mi saŭdadas la amikojn, kiujn mi neniam plu vidis, personojn, kun kiuj mi ne plu parolis aŭ renkontis... Mi saŭdadas mian infanaĝon, mian unuan amon, la duan, la trian, la lastan kaj la amojn, kiujn mi ankoraŭ havos, se Dio permesos...

Mi saŭdadas la nuntempon, kiam mi ne profitas ĉion, por memori la pasintecon kaj por veti la estontecon... Mi saŭdadas la estontecon, se poste la efektivigo, eble ne okazos tiel, kiel mi pensas, ke ĝi okazos... Mi saŭdadas al tiu, kiu lasis min kaj tiun, kiun mi lasis, kiu diris ke venus, sed ne aperis; kiu aperis kurinte, kaj preskaŭ ne konis min, kiun mi neniam havos ŝancon koni.

Mi saŭdadas tiun, kiu forveturis kaj kiun mi ne adiaŭis bone; kiu ne sukcesis adiaŭi min; kiu pasis en la ŝoseo antagonista al la mia vivo kaj kiu mi nur vidis tre rapide; aferoj, kiujn mi havis kaj aliaj, kiujn mi ne havis, sed multe volis havi; aferojn, kiujn mi ne scias ĉu ili ekzistis, sed kiun se mi scius, certe dezirus mi provi;...

Mi saŭdadas seriozajn aferojn, amuzajn aferojn, okazaĵojn, travivaĵojn...

Mi saŭdadas la hundeton, kiun mi havis antaŭe kaj kiu min amis lojale, tiel kiel nur hundoj kapablas fari, la librojn kiun mi legis kaj faris min vojaĝi, la diskojn,

kiujn mi aŭdis kaj kiu faris min sonĝi, la okazaĵojn. kiujn mi vivis kaj la okazaĵojn, kiujn mi lasis preterpasi sen profiti tute.

Multajn fojojn mi volas trovi tion, kion mi ne scias, mi ne scias kie, por serĉi ion, mi nek scias kion, nek kie mi ĝin perdis...

Mi vidas la mondon turniĝi, kaj mi pensas, ke mi povus senti saŭdadon en la japana, en la rusa, la itala, en la angla, sed mia saŭdado nur parolas portugalan kaj Esperanton, kvankam se profunde ĝi povas paroli ĉiulingve.

Mi kredas ke la simpla *I miss you*, neniam havos la samajn fortecon kaj signifon kiel nia vorteto. Eble ne esprimas, ĝuste, la grandegan mankon, kiun ni sentas pri karaj aferoj aŭ personoj. Kaj pro tio mi sentas pli da saŭdado... Ĉar mi trovis vorton por uzi ĉiam, kiam mi sentas ĉi tiun doloron en la koro, iomete malĝoja, iomete ĝoja, sed ke funkcias plej bone ol vitala signo kiam oni volas paroli pri vivo kaj pri sentoj.

Ĝi estas la senerara pruvo pri tio, ke ni estas impresigemaj, ke ni amis multe la aferojn, kiujn ni havis kaj ni bedaŭras la bonajn aferojn, kiujn ni perdis dum la ekzistado nia...

Senti saŭdadon estas signo pri tio, ke oni vivas!

*Maria Eugenia  
kaj Ariádene*

## PROKOKOLO DE LA KUNVENO DE 27-01-03

- 1.- **Reformo de la Statuto.** José Pina Tuells proponas reformi la statuton por ŝanĝi la adreson de la asocio, la Prezidanto diras ke tion oni jam faris en 1997, sed ankoraŭ mankas oficialigi tion je registara oficejo, kion li mem faros tuj.
- 2.- **Pli demokratiso.** La Prezidanto proponas, ke la legantoj povu baloti. Li diras ke estas punkto de nia programo. La estraro aprobas ĝin, sed ankoraŭ decidis, ke pro tio, ke ĝi implicas ŝanĝi la Statuton, oni devas organizi referendumon. Je la venonta numero de la bulteno ni prezentos la procezon fari tion.  
 Jesuo de las Heras diras, ke tio estas diskriminacio rilate tiujn HALEanojn, kiuj per siaj kotizoj subtenas la asocion, dum ke la ceteraj legantoj de *Kajero el la Sudo* ne subtenas la asocion. Sed oni balotas, kaj fine la estraro aprobas tion, ke la Haleanoj havas la rajton baloti kaj kiel haleanoj kaj kiel legantoj.
- 3.- **Afero Sat kaj Hale.** La redaktoro de nia bulteno parolas pri la lastaj novaĵoj, kaj lia respondo. Jesuo diras ke Jakvo mensogas kaj insultas lin kaj la asocion, kaj pro tiu sinteno de Jakvo, li petis al SAT, ke decidu La Klomjektokomisiono, tiel, kiel la artikolo 7-a de la Statuto de SAT postulas, tamen klarigante, ke li ne petas al KK, ke oni eksigu Jakvon, sed nur tion, ke oni forprenu de li tiun povon, kiun li misuzas, nome raportisto pri Kongreso de SAT kaj prizorganto de dissendolistoj. La Prezidanto kritikis parton de la respondo kaj la peton de Jesuo al SAT kaj asertas, ke li prezentos proponon al SAT celante solvi la novan problemon, ke nativa ano de la Generala Konsilantaro de SAT estis eksigita de la dissendolisto de la Generala Konsilantaro de SAT.
- 4.- **Jarkotizo.** Jesuo de las Heras diras, ke li ricevis 10 eŭrojn en letero por la jarkotizo, sed la jarkotizo estas 6 eŭroj. Kion fari? Li proponas, ke oni plialtigu la kotizon al 10 eŭroj, sed la ceteraj estraranoj rifuzis la proponon de Jesuo kaj aprobis la malan proponon de la Prezidanto, ke la jarkotizo malplialtigu al 5 eŭroj jare. La kasistino respondas, ke la Asocio ne havas financon problemon en la tuj o tempo, eĉ se la jarkotizo malaltigas. La estraro interkonsentas konsideri, ke tiuj anoj, kiuj jam pagis 10 eŭrojn, pagis la kotizon je du jaroj.
- 5.- **Kiel plibonigi la Asocion?** Petro, nia nova Vicprezidanto, demandas al kunestraranoj kiel plibonigi la Asocion. La Prezidanto respondas, ke estas nia deo plibonigi *Kajerojn el la Sudo* per novaj artikoloj. Jozefo Pina diras, ke *Kajeroj* defendas punktojn preskaŭ de ekstrema maldekstro, kiel la okupo de domoj neloĝataj. La Prezidanto respondas, ke nia bulteno defendas ideojn, kaj petas planojn por plibonigi la *Kajerojn*, sed sen perdi nian respekton al libera esprimado, kvankam tio povas ofendi malamikon de libereco, kaj okaze ankoraŭ kelkajn amikojn de ĝi pro miskompreno, timo aŭ troigo.

Je la 27-a de januaro de 2003, en Mursjo subskribas la protokolon

*Prezidanto Cabezas Martínez.*

## Enkonduko en muzikon

# Hector Berlioz

Ĉi tiun jaron, la 11-an de decembro, estas la ducentjariĝo de lia naskiĝo en urbeto La Côte-Saint-André (la marbordo de Sankta Andreo), kuŝante inter Vienne (vjen), Lyon (ljon) kaj Grenoble (grenobl), je la kvina matene. Li pasis dek ok jarojn tie, kaj poste li translokiĝis al Parizo celante iĝi doktoron, same kiel lia patro. Tamen, en 1822 li komencis studi muzikon, kaj en 1826 li iĝis lernanto de la fama Konservatorio de Parizo.

Li konis aktorinon irlandan, kiu rolis Ofelian en la verko de Ŝespir *Hamlet*, kaj arde enamiĝis al ŝi kaj al la verkoj de la majstro de Anglio. En 1830 li komponis la *Simfonion Fantazian* (partoj unu- a: *Revoj kaj pasioj*, dua: *Balo*, tria: *Sceno en kampoj*, kvara: *Marŝo al mortigejo*, kaj kvina: *Sonĝo pri nokto sabata*), sian plej faman verkon, kiun li subtitolis *Epizodoj en vivo de artisto*, kie oni volas vidi lian pasion al Miss Smithson.

Aliaj famaj verkoj de Berljoz' estas *Haroldo en Italio*, *Simfonio funebra kaj triumfa*, *Romeo kaj Julieto*, la *Granda Meso de mortintoj* (alidirate *Requiem*), *La trojanoj*, la *Roma karnavalo*

kaj la opero *Benvenuto Ĉelini*, kiu ne estis tre sukcesa tiam.

Estas bedaŭrinda afero, ke Berljoz ne konis Esperanton, ĉar li havis multajn trajtojn komunaj al la tipa esperantisto. ☺ Li mortis en 1869, tio estas, 18 jaroj antaŭ Zamenhof publikigis sian *Unuan Libron*. Berljoz' estis novigulo, kiun oni neniam komprenis. Liajn operojn oni ne facile aktorigis ĉar oni preferis dramojn de Vagnero, kaj liaj simfonioj kaj verkoj religiaj estis tre malfacilaj ludi, kaj oni trovis ilin ekscentrikaj.

Persone, li estis obstina kaj havis specialan humuron, kiu aparte vundis stultulojn. Li ne omaĝis siajn instruistojn konservatoriajn, kaj lia opinio pri siaj samtempaj komponistoj francaj kaj italaj estis vere malalta. Pro tio, ke dum sia vivo li ne sukcesis kiel komponisto, li devis gajni sian vivon kiel kritikisto, kaj pro tio ni konas sian penson pri muzikarto, kiujn li publikigis en gazetoj *Eŭropo Literatura* (1833), *Renoviganto* (de 1833 al 1835), *La Gazeto Muzika* (de 1834 al 1840), kaj la *ĵurnalo pri debatoj*. Ankaŭ li verkis faman *Grandan Manlibron pri instrumentaro kaj orĥestriĝo moderna* (1843), kiun oni



ankoraŭ studas en konservatorioj en la tuta mondo; kaj aliaj libroj: *La gvidanto de orĥestro: teorio pri lia arto* (1856), *Vojaĝo muzika en Germanion kaj Italion* (1843), *La vesperoj de la orĥestro* (1852), *Tra la kantoj* (1862), *Absurdaĵoj de muziko* (1859), *Memoraĵoj* (1870), kaj *La muzikistoj kaj la muziko* (1903), kiun oni publikigis post lia morto, kompreneble. Plej mirinde pri tio, estas, ke Berljoz neniam mastrumis iun ajn instrumenton muzikan. Li nur povis ludi gitaron je tre limigita maniero, kiun li lernis ludi dum mallonga tempo en sia naskiĝurbo, kiel junulo, de S-ro Dorant, kiu ankaŭ instruis lin kiel komponi muzikon. Tio pridifinas Berljozon kiel memlernanton, ĉar antaŭ ol li iris al Parizo, en sia juneco, li lernis komponarton ankaŭ per la manlibroj publikigitaj de francaj komponistoj Johano Filipo Rameau (ramo', 1683 al 1764) kaj Karlo Simono Catel (katel', 1773 al 1830).



## BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Poŝtkesto 4461, Tfn° (00 34) 615  
E30080 MURCIA, 427 143  
HISPANIO

Retskribu al  
[jesuo@ono.com](mailto:jesuo@ono.com)

<http://www.iespana.es/kajeroj.htm>

<http://storm.prohosting.com/jesuo> Esperanto@iespana.es

### *La Statuto de SAT*

#### KONGRESO

18. Ĉiujare okazas Kongreso de SAT, kies lokon, daton kaj kondiĉojn difinas la P.K., laŭeble konforme al deziro de la antaŭlasta Kongreso.
19. La Kongreso ekzamenas, aprobas, aŭ malaprobas la moralajn kaj financajn raportojn de la P.K. kaj de la Ĝ.K., kiuj laŭeble devas esti koncize aperigitaj en la presorgano plej laste 20 tagojn antaŭ la Kongreso.
20. La Kongreso esploras diversajn proponojn pri la agado de la venonta jaro kaj vortigas siajn konstatojn kaj dezirojn, konigotajn al la tuta anaro. —La Kongreso esprimas pri ĉiuj proponoj sian opinion aproban aŭ malaproban. Referendumo findecidas pri ĉiuj proponoj.

#### PROPONOJ KAJ VOĈDONOJ

21. Ĉiu aktiva membro rajtas sendi proponojn pri la agado de la Asocio al P.K., kiu post ekzameno decidas pri ilia publikigo en la presorgano. Principaj proponoj estu publikigitaj almenaŭ ses monatojn antaŭ la kongreso.
22. Ĉiun proponon prezentatan de almenaŭ 1/10 de la membraro, la P.K. estas devigata publikigi en la presorgano.
23. 2/10 el la membraro rajtas postuli la okazigon de referendumo pri malfido al la P.K. aŭ pri ĉiu ajn demando havanta grandan intereson por la tuta Asocio.

*La 6<sup>a</sup> kaj 7<sup>a</sup> paĝoj  
de la Statuto de SAT*